La Kongreso de Aŭstria Esperantista Federacio okazos la 29-31/8/1947 en Kufstein, Tirol. Por morale apogi la Movadon en Aŭstrujo kaj influi la ne-esperantistojn, ĉiuj E. organizaĵoj, grupoj, instancoj kaj Esperantistoj ĝenerale estas petataj sendi saluton al : Esperanto-Kongreskomitato, prezidanto : Dro A. Huber, Kufstein Zell, Tirol, Aŭstrujo.

OLIVA

verkis : E. Claes

el la flandra : Verda kaj Hedero

Kiam la fervojo de Zichem al Scherpenheuvel estis konstruata, unu el la valonaj inspektoroj ekloĝis en la blanka domo ne tre distanca de la nia, voje al Averbode, ĉe la ŝoseo. Iun matenon, mi iris al la lernejo kaj vidis antaŭ mi tri knabinetojn paŝi sur la vojo, ankaŭ en la direkto de la vilaĝo. La plej granda mantenis la plej etan. Ili apenaŭ timeme rigardis min, kiam ilin mi atingis kaj, nesalutante, preterpasis. Estis la tri filinetoj de « la Valono », kiuj aliris la knabinan lernejon. Tagmeze mi revidis ilin, mi aŭdis ilin france interbabilii, mi vidis ilin la postan tagon mi vidis ilin ĉiutage, mi scias ke la plej granda knabina nomiĝas Oliva, kaj... kaj por mi, ĉio bela, bona, kara, angela, dezirinda en la mondo nomiĝis Oliva. Kontraŭ tio, ĉio malgravis. Machteld, Veerle, Dakerlia, Lieske, ĉiujn noblajn kaj blondajn romanvirgulinon kaj librojunkrinojn de Flandrujo eklipsis ŝia valona palpeblajo, la malhelaj okuloj, la rondaj vangoj kaj la nigra hararo de Oliva, kiu estis la filino de... Liliano. Mi konsciis ke mi perfidas Machteld kaj Veerle. Vespere, enlite fermante la okulojn, mi vidis antaŭ mi nete konturiĝi Jan Breydel kiu, seniluziigite, riproĉe rigardis min kaj sopiris : Nest, vi disrevigas min ! » En mia koro mi lojale penis ne enamiĝi al Oliva, sed revidi ŝin la postan tagon sufiĉis por ke mi falu. Matene, ironte al la lernejo, mi atendis ĝis mi vidis la tri fratinetojn paŝi. Tiam mi rapidis, malantaŭis dudek paŝojn, neniel petolis, eĉ ne levprenis ŝtoneton, ĝis la placo, kie ili flankeniĝis dekstren kaj mi rekte vojis plu al la knaba lernejo. En la klaso, mi plej ŝatis rigardadi en la Biblio Judith, kiu senkapigis Holophernes, ĉar, ŝajnis al mi, ŝi similis al Oliva. Kiam la lernantoj blufis inter si pri sia knabino, ŝia « kapriceto », mi ade nomis Ree van Rikus de la Angulo, ĉar mi dancis kun ŝi okaze de la Johana kermeso. La nomon de Oliva mi neniam diris al iu, ĝi estis tro sankta por mi, miaj sentoj estis tro veraj kaj puraj. Post la lecionoj, mi troitis ĝis la domo de la vojisto, tie vegetis ĝis Oliva reaperis kaj, je dudekpaŝa distanco, mi sekvis. Kiam ni feris, dimanĉe, jaŭde posttagmeze, mi kuŝiĝis malantaŭ la heĝon de la ĝardeno de Oliva por vidi ŝin, aŭdi ŝian voĉon kiam ŝi tie ludis. Mi dufoje atentigis ŝin pri mi, jetante ŝtonetojn en la ĝardenon. Ĉiutage mi esploris mian vizaĝon en la spegulo. Mi trovis min urse malbela : sunbrulumita vizaĝo, grandaj oreloj, blankaj pikharoj. Iun tagon, mia patrino komisiis min fari acetan en butikoj, kaj kiam mi revenis, ligita kaprino paŝtiĝis sur la vojorando apud la domo de la Valono. La kaprino de Oliva ! Mi lasis la beston forrodi la kuketon, klun mi ricevis en la butikoj, mi karesis ŝiajn orelojn, frapetis ŝian ventron, frotis ŝian mentonon, premis ŝian malmolan kapon al mia vango, tiel flate kiel mi neniam traktis beston, eĉ ne homon. La kaprino ŝajne neniel komprenis miajn afablaĵojn kaj volis kornobati. Ŝi ja ne povis diveni ke por mi ŝi reprezentas alian estajon. En la mallumo mi metis iun vesperon tri duonmaturajn pomojn sur fenestrobeton de la hejmo de Oliva. Kiam, la postan tagon, mi vidis en la lernejo Jul van Rikus, kiu loĝis malantaŭ la domo de la Valono, mordi pomon kiu tre similis miajn pomojn, mia koro sangis de nigra vengemo. En tiuj tagoj mi travivis amare deprimajn momentojn. Mi ankaŭ fariĝis pli trankvila, preskaŭ modele virta, io dolĉa penetris ĉiujn miajn agojn, ankaŭ interne. Kiam dimanĉe mi rigardis la statueton de la sankta Virgolino kun la ĉirkaŭe brulantaj kandeloj, mi pensis pri Oliva.

Infanamo ! — Do io ridetiga, Olinjo.

Por mi mem mi mallaŭte diras vian nomon. Neniam mi parolis kun vi, saluti vin mi eĉ ne kuraĝis. Eĉ ne per miaj fingropintoj mi kuraĝis tuŝi vian maneton, nur sen via scio mi kuraĝis rigardi vin. Poste mi neniam plu vidis vin, eĉ neniam plu aŭdis de iu ajn prononci vian nomon. Sed pura kiel florfo-

lieto vi restis en mia memoro, Olinjo. Mi ankoraŭ vidas vin antaŭ mi, precipe viajn infanokulojn, timajn ĉar neniu komprenas vian lingvon. Vi estis por mi kia unua matenkrepusko de granda infanaspiro al ĝojo aŭ eble al ĉagreno aŭ al vivobelo. Kaj en ĉiuj miaj infanmemoroj staras via bildo, knabineto el Valonujo, kiel la plej kara, la plej pura, kiel sanktaĵo kun ĉirkaŭaj kandelotoj.

Cu vi ankoraŭ vivas ? Cu de tiam vi feliĉis ?

Infanamo. — Ni do ridetu, Olinjo.

Dimanĉe. La posttagmeza diservo finiĝis. Super la marĉa tero de Zichem, la varmega somersuno. Ni eniris la paŝtejojn, rigardadis la fiŝistojn, la naĝantojn, mem naĝis, vagis laŭ la kanaloj kaj riveretoj kaj revenis al la ŝoseo. En la foro, ni subite vidis ion mirindan. Estis malgranda ĉareto, ne hundoĉaro, — sed ja kio jungita al ĝi aŭ sidanta sur ĝi ? ? Ni kuregis antaŭen kaj fine vidis... Kaprino antaŭis la ĉareton kaj en ĝi sidis la tri filinetoj de la valono, la du pli junaj kun la vizaĝo malantaŭen, Oliva antaŭe kaj flanke de ŝi... Nest Schuyten, kiu ludis koĉeron.

Mi kredas ke la dramo en mia koro estus estinta malpli dolora, se alia knabo estus sidinta flanke de Oliva. Sed ĝuste Nest Schuyten !... Ja sidante flanke de mi a Oliva, en mia ĉareto kaj kiu neniel pli ol mi konis la valonan. Mia koro haltis, mi blankiĝis, mi estus mordinta arbon pro kolero, ĵaluzo, ĉagreno, malespero. Kun ŝnurita gorgo, mi paŝis kun la aliaj knaboj apud la ĉareto. Nest mienis kvazaŭ li ne vidus nin, kvazaŭ ni estus tro malaltaj, li rigardis nur la kapon de la kaprino, de mi a kaprino, al kiu mi donis mian kuketon, kiun mi karesis. Li kriis dju kaj aversee kaj allee kvazaŭ france. Oni bone rimarkis ke la valona kaprino ne komprenas lin. Li rugis de fierego. Petik van de Lange demandis al li : « Cu via karulino, knabo ? » Se li estus jesinta, mi estus plenuminta murdon. Antaŭ ol ni atingis la stacidomon jam dudekkvoro da knaboj flankis la ĉareton. La jungilaro el flava ledo kun arĝentaj sonoriletoj kaj la vipo kun ruĝa tenilo estis ĝenerale admirataj. Tio estis riĉo. La kaprino ŝajne streĉis siajn fortojn por antaŭenigi sian ŝarĝon kaj de temp' al tempo strabis al la buboj : ĉu ili ne iom puŝu la ĉareton ? Duon da fojoj ŝi haltis por ripozi. Tiam ni ĉiuj haltis kaj atentis kion la kaprino faris kaj, kiam estis finite, ni plu akompanis ŝin.

Neniam mi tiel skandale krule traktis kaj bategis studkunulon, kiel la postan tagon, ĉe la klasofino, Nest Schuyten, kiu ne scias kial. Sed ankaŭ mia vizaĝo estis unu sanga skrapovundo. Lia patro, Stainke Schuyten, venis plendi ĉe ni. Sed vidinte mian vizaĝon, li ne insistis kaj hejmeniris konsolita kaj kontenta.

Kelkajn semajnojn poste, la valono definitive forlasis la regionon kun siaj tri filinetoj, kun la kaprino kaj la ĉareto. En ĉi tiu li samtempe kunprenis mian unuan amon.

(El « Jeugd » — « Juneco »)

Klarigaj notoj :

Zichem, Scherpenheuvel, Averbode : brabantaj komunumoj.

Machteld, Veerle, Lieske, Dakerlia : famaj heroinoj el la flandraj historioj kaj literaturo.

Jan Breydel : fama figuro el la Iberiga batelo de la flandroj en la XIV-a j.c., unu el la gvidantoj de la « Klauwaards » (unganoj : pro la ungoj de la leono, figuranta en la blazono de la Flandroj), kontraŭ la partianoj de la tiama franca reĝo, kiujn oni nomis « Lellaards » (Lilianoj : pro la tri lilioj, kiuj ornamis la blazonŝildon de la francaj reĝoj de la familio de la « Bourbons »).

Nest : malplilongigo de la antaŭ nomo de la aŭtoro, Ernest.

Ree kaj Jul van Rikus de la Angulo, Nest Schuyten, Petik van de Lange : flandraj antaŭnomoj kaj nomoj.

Judith kaj Holophernes : bibliaj personoj ; la unua, judino el Betulia, mortigis la duan, asiran armeestron, okaze de la sieĝo de la dirita urbo en 647 antaŭ Kristo.

dju, aversee, allee : kripligo de la francaj vortoj hue (antaŭen), avancez (antaŭeniru), allez (iru).

WAT ZEGGEN ZIJ OVER ESPERANTO ?



Louis Lumière, lid der Wetenschappelijke Akademie, uitvinder der kinematografie.

Ik ben er van overtuigd dat de algemene aanvaarding van het Esperanto uitstekende gevolgen kan hebben op het gebied der internationale betrekkingen en voor de wereldvrede. Het komt er echter op aan het Esperanto als verplicht leervak ingevoerd te krijgen in de scholen. De inspanning die hierdoor van de jongelui zou worden geveerd, NA het lager onderwijs, dat zich dienaangaande tot de studie van de moedertaal zou moeten beperken, zou werkelijk gering zijn en de grondslag leggen voor de internationale betrekkingen en uitwisselingen alderhande.

Esperanto-tagoj en Bergen-op-Zoom

Okaze de la 60-jareco de Esperanto, la lokaj sekcioj de LEEN kaj NK, kun konsento de NCKE, organizos, la 27.7.47, specialan E. tagon, en kiu la nova memorigaĵo de la E. monumento (la nura, kiu restis konservita en Eŭropo !) estos malkovrita de la Oficiala Instruista Reprezentanto, J.C.A.F. Kuipers. La partoprenantoj estos akceptataj de la Urbestro Ir. H.B.J. Witte en la Urbodomo. Varia programo disvolviĝos la tutan tagon : Diservo por katolikoj kaj versajne por Protestantoj, komuna tagmanĝo, vizito de vidindaĵoj, teatraĵetoj ktp. Ankaŭ sabate, aranĝoj estas antaŭviditaj. Oni senprokraste anoncu sin ĉe : Esperanto Propaganda-Commissie, Antwerpsestr. 45, Bergen op Zoom (Nederland), kie ĉiuj informoj estos volonte donitaj.

Tutmonda Junular-Organizo

La Tutmonda Junular-Organizo, restarigita en 1945, organizos trian Internacian Junular-kunvenon tutsemajnan en Ipswich (Anglujo) en Aŭgusto venonta ; pri ĝi, kiel cetera pri tiuj de Groet (Ned.) kaj Tervuren (Belg.), filmo estos farita.

Ekde 1945 TJO regule eldonis, kiel antaŭ la milito « La Juna(n) Vivo(n) », organon por gejunuloj, edukatoj kaj junular-amikoj ; ĝi fariĝis de 1.7.47 la oficiala organo de I.I.K. (Internacia Instruista Kunlaboro).

Por pruvi sin parto de la tuta Esperanto-movado, TJO decidis aliĝi, kiel organiza fako, al UEA.

Informojn petu ĉe la sekretario : M. v.d. Horst, Johan Idastr. 32 Rotterdam N. (Ned.).

Hungarujo

El propono akceptita en Budapeŝto, la 3.5.47, de la Socialdemokrata Partio rezultas jeno : La Partio konstatis kun granda ĝojo ke, grandparte pro ĝia apogo, la instruado de Esperanto komenciĝis en pluraj lernejoj ; ĝi opinias necesa la devigan instruon de Esperanto en kiel eble plej multaj lernejoj. Ĝi nomas la subtenon kaj disvastigon de Esperanto necesa i.a. por la plialtigo de la internacia spirito de la laborista movado kaj akceptas Esperanton kiel unu el la lingvoj de siaj internaciaj rilatoj.

GRAVA AVIZO

Flandra Esperanto-Instituto estos fermita de la 25-a de julio ĝis la 18-a de aŭgusto. Mendojn kaj korespondajojn sendu antaŭ aŭ post tiuj datoj !



Flandra Esperanto-Instituto
V.z.W.

P. v. Humbeekstraat 3,
Brussel-West
(Postrekening: 3268.51)

Ĉu sur via librobreto troviĝas la sekvantaj verkoj, kiuj *komplete* elĉerpigis ĉe la koncernaj eldonejoj kaj de kiuj restas en nia Instituto nur malgranda kvanto (de kelkaj titoloj nur du-tri ekz.)? Tuj esploru vian bibliotekon kaj senprokraste faru la mendon antaŭ kom-
pleta elĉerpigo!

- En Okcidento nenio nova* de Remarque 252 p. Bindita : fr. 97
- Ŝi de H. Rider Haggard* 278 p. Bindita : fr. 50
- Fanny de Edna Ferber* 240 p. Bindita : fr. 50
- Riĉa kaj sen mono* de Oppenheim 22 p. Bindita : fr. 50
- Hindo rigardas Svedlandon* de Sinder 200 p. Bindita : fr. 60
- Cirkaŭ la mondo* de J. Scherer 272 p. Abunde ilustrita : fr. 50
- Luno de Israel* de R. Haggard 220 p. Broŝurita : fr. 35
- Strato de fiŝanta kato* de Földes 268 p. Broŝ. : fr. 60; Bind. : fr. 75
- Maljunulo migras* de St. Engholm 48 p. Broŝurita : fr. 21
- Esperanto-English Dictionary* de E. Millidge 490 p. Bindita : fr. 120

BALDAŬ DE PLU LIVEREBLAJ!

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMIO: Post la 24-a enigmo, s-ro P. H. Mooij el Brussel gajnis la premion. Gratulojn!

Sekvas kun 8 p.: ges-roj De Baets, Laporte, Pintelon A., Popelier, Verda; 6 p.: ges-roj Deckkers, Lodema, Roose F.; 5 p.: ges-roj De Kersgieter, Dhaens, Haneveir, Jurion, Maertens, Pintelon R., Steegmans. Ktp.

SOLVO DE LA 25-a ENIGMO.

Manpremo. Inperiestro. Sukoplana. Violkolora. Instruita. Apotekisto. Proksimumo. Stacidomo. Partopreni. Servistino. Piedpilko. Virgulino. Promenejo. Farmbieno. Ĉielarko. Poŝtmarko. Akvovilio. Samideano. Piedfingro. Sonorilaro. Familiano. Subaĉeti. Malliberejo. Interparolado. Kamparano. Kapdoloro. Vegetarano. Stupetaro. Boatveturi. Nenu estas profeto en sia landeto.

N-ro 26: KRUCVORTENIGMO.

HORIZONTALA. 1. impresanta guston, kiel mielo; fari ŝtrumpojn. — 2. la akvo fluas al ĝi (R). — 3. de neniu speco; troige ŝparema. — 4. akordigi du vortojn laŭ la sono de la lasta silabo akcentata (R). — 5. ovoforma; krustulo. — 7. rapide fermi kaj malfermi la okulojn (R). — 8. Konjunkcio. — 9. lignopeco (R); meti la piedojn alterne unu antaŭ la alia. — 10. konjunkcio. — 11. fama Esperanto-aŭtoro.

VERTIKALE. 1. oni bezonas ĝin por manĝi; ŝvelinta. — 2. batilo. — 3. apartenanta al la lando. — 4. balancetante dormigi (R); prepozicio. — 5. impresanta la guston kiel kakao; prepozicio. — 6. prefikso; prepozicio. — 7. surrela omnibuso; prefikso. — 8. flanko de domo (R); mezuri la pezon (R). — 9. rilatanta al iu eŭropa lando; mallongigo de konata Esperanto-grupigo internacia. — 10. iumaniere movi boaton (R). — 11. ĉiuj instrumentoj de metiisto; plenkreska knabo (R).

La solvon oni sendu sur aparta folio al POSTBUS 342, BRUSSEL, antaŭ la 31 de julio 1947.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											

CAPITRO 25-a

La okuloj de Profesoro De Groot deturniĝis de la sen viva korpo.

«Li tuj mortis, Inspektoro. Kaj la kadavro?»

«Egale,» Kant lace diris. «Preparu ĉiukaze mortateston. Se la veturo ankoraŭ daŭrus iom, ni atingus Marseille kun kargo da kadavroj. Feliĉe, nun la afero finiĝis.»

La kapo de sinjorino Steinmann kuŝis sur la tablo. Kiam la tri viroj enpaŝis, ŝi iom rektigis.

«Ĉu... ĉu... li...?»

«Jes, sinjorino,» Kant dolĉe diris, «ĉu vi ne preferas aliri la ĉambron de via filo? Lin mem mi senprokraste sendos al vi. Por vi ne taŭgas ĉi tie. Via edzo juĝis sin mem...»

«Estas terure», ŝi rauke flustris.

La spuristo reinsistis ke ŝi aliru alian kajuton. Ŝi senvole lasis sin forkonduki de Doktoro Gulopez. Kant malvigle direktis sin al sia ejo. Pli ol iam li bezonis ripozon. Tamen li antaŭe liberigis Alex. Ties kazo restu provizore neglektita. Jam sufiĉe gravis!

La granda vila mano de Kapitano Joost frotis lian pezan mentonon en lia karakteriza maniero.

«Neptuno!... Neptuno!... bela okazaĵo! Ĉu vojaĝo... Vi tamen malkovris lin? Mi fine komencis malesperi. Mi do liberigu la alian kanajlon?»

«Jes, pri tiu kazo ni provizore fermu la okulojn, Kapitano. Kiam ni atingos Marseille?»

«Plej laste morgaŭ tagmeze. La ŝalupo bone antaŭeniras. Ĉu la markonisto eble telegrafu ion?»

«Jes, sed mi antaŭe redaktu la telegramojn.»

En sia kajuto, Kant skribis tri da il. Unu al la juĝa polico de Marseille, unu al la havenpolico kaj unu al iu Monsieur Pierre Lacroix, ĉefo de la Prokurora oficejo de la departemento Bouches-du-Rhone kaj kiu, laŭ la kora tono, certe estis persona konato de la Antverpenano. Doktoro Gulopez revidis lin tiel okupata.

«Mi preskaŭ finis, Doktoro. Miaj telegramoj pretas. Mi ilin portos for kaj poste mi iras dormi. Morgaŭ antaŭtagmeze mi verkos mian oficialan raporton. Mi ankoraŭ havas la tempon. Ankaŭ vi foje serioze ripozu. Mi ne plu bezonas vin», Kant riditis, etendis manon kaj varme diris: «Dankon pro via kompleksa helpo!»

«Sen danko,» simple diris la ŝakmajstro, «sed mi ankoraŭ havas peton.»

«Anticipe konsentitan»

«Ĉu mi povas disponi la ŝlosilon de la ejo de Maxton?»

«Ĉu nepre serioze? Ankoraŭ ĉiam ne konvinkita? Nu, jen. Dirite, farote.»

«Kaj krome, la fantomo sur la ferdeko...»

«Ne gravas, Doktoro.»

«Mi bedaŭras, Inspektoro, mi ne insistas, kvankam mi supozas ke vi scias kiu estis.»

«Jes, estas vere, mi estu sincera, mi ne volonte diras tion pro vi.»

«Nu, nu! Sed nun mi vere iĝas scivola! Mi petas...»

«Bone, estis... fraŭlino Durllet!»

Gulopez iel mallevis la okulojn.

«Mi konjektis tion, li mallaŭte konfesis. «Si do mensogis?»

«Ne, ŝi fakte ne mensogis, nur ne deklaris la plenan veron,» Kant senkulpigis.

«Nu, nu...» Gulopez meditis. «Sed ankaŭ vi ŝuldas ekplikon al mi. Kiel tio koncernas min?»

«Nu, Doktoro,» la detektivo serioze

JAĤTO VETURAS EL...

«KRIMINALA ROMANO»

Verkis: Deck Dorval.
Tradukis: Dro T. Ken.

diris, «kiel viroj, kiel amikoj, ni rapide solvu la aferon. Mi unue konfesu ke mi pli ol simpatiis fraŭlinon Durllet. Tamen mi baldaŭ sentis denove la teron sub la piedoj, rimarkante ke vi ne estas indiferenta por ŝi kaj ke vi mem viaflanke...»

«Konsentu interrompon, sinjoro Kant, sed vi eraras koncerne fraŭlinon Durllet kaj min. Mi ĉiam trovis ŝin simpatia, eble ankaŭ ŝi min, mi esperas, sed ne pli. Mi cetere jam delonge fianĉigis...»

Kant gapis de mirego.

«Pardonu, Doktoro, tion mi ne scias.» Sekvis mallonga silento. «Nun mi plu klarigos ĉion al vi. Kiam hieraŭ, post la tagmanĝo, mi aŭdis fraŭlinon Durllet disvolvi tiun ŝakteorion, mi unue opiniis ke ĝin instruis vi al ŝi. Kiam poste, vi klarigis al mi ke tio maleblas, mi subite scias ke estis ŝi, kiu restadis, la murdovesperon, sur la ferdeko. Preskaŭ laŭvorte ŝi ripetis kion ni diris inter ni. Mi tiumomente iom malbonhumoris. Vi ja memoras...»

«Mi neniel atentis tion, vere...»

Gulopez intencis aldoni ion, sed ŝanĝis la decidon, etendis manon al Kant kaj serioze diris:

«Vi estas vera kamarado, sinjoro Kant, mi estas feliĉa ĉar mi ekkonis vin. Sed mi nun deziras al vi bonan nokton. Morgaŭ malfacila tago sendube atendos vin. Bone dormu!» La pala rideto de Gulopez estis enigma.

Kant reve postrestis. Li fiksis sian vekhorloĝeton je la sesa kaj fordonis sin al *Morfeo*. Trihoran ripozon li konsentis al si.

Kiam, je la dirita horo, la vekhorloĝo sonis, li haltigis ĝin kun malbonnumera gesto, ankoraŭ momenton fermis la okulojn, sed fine trene levigis. Nur kiam li ĝuis la lukson de malvarma duŝo, li ree sentis sin vigla, eĉ malsatis. En la ejo de Maxton li trovis Gulopez sidanta en klubfotelo kaj fiksrigardanta la portreton de Elly. Tiel li videble pasigis longan tempon. Ĉiukaze amaso da stumpetoj de cigaredoj plenigis la cindruĵeton, kiu staris flanke de li. La fumo ŝvebis eksteren tra la maldekstra lukopordeto. Por teni ĝin aperta, Gulopez interŝovis ebonan linilon.

«Doktoro, kia vi aspektas?» Kant malkvietigis. «Per Dio, kion vi tiel longe faris tie ĉi?»

«Mi foje meditis funde pri ĉio,» Gulopez sopiris.

«Nu, refreŝigu vin. Vi ankoraŭ disponas du-tri horojn. Mi intencas inviti je la oka Profesoro De Groot kaj nian bravan Kapitanon al mallonga disvolvado. Ĉu ankaŭ vi bonvole ĉeestos?»

«Volonte,» Gulopez reve diris, dum li kontinue rigardis Elly Maxton, kvazaŭ li atendus de ŝi la savon.

Kant lasis lin sola kaj promenis al la mangosalono. Ankoraŭ neniu. En ĝi tro varmism por li, juĝis, kaj li mendis duon da panetoj.

La kelnero vere personigis la komplezon.

«Ne penu, amiko. Mi mem kunprenos la panetojn sur la ferdekon. Vi simple portu tason da kafo. Dankon.»

Supre, li preskaŭ eligis krimon de surprizo. Triborde, kliniĝinte sur la pavezo, Yvonne staris. Feliĉe, ŝi ne jam vidis lin. Li restis momenton sendecida. Tiam

ŝi turnis sin, kvazaŭ sentante la okulojn direktitajn al ŝi.

«Ho! Sinjoro Kant. Jam tiel frue el la lito? Mi eksciis de la dejoranta oficiro ke vi okupis vin ĝis malfrua nokto kaj ja solvis la murdokazon. Mirinda laboro! Ĉu mi povas gratuli?» Ŝi etendis sian delikatan sveitan manon, kiu komplete perdis en la pugnego de Kant.

«Dankon, fraŭlino Durllet. Ĝi ne estis tiel kolosa...!» li senhelpe reagis, «mi intencis matenmanĝi ĉi tie.»

«Brila ideo. Ĉu ni kune ĉetabliĝu?» Kant malcerte ĉirkaŭrigardis. Feliĉe, jen alvenis la kelnero kun kafo. En la daŭro de fulmo, li instalas, laŭ peto de Kant, tableton kaj kovris ĝin por du.

«Jam horetan mi estas supre», ŝi verve babilis, «ĉi tie ĉio tiom belas...» Ŝi montris la foran teron, «Korsiko!...»

«Jes,» Kant diligente diris, «oblikve malantaŭ ni, situas «Ile Rousse» kaj ion pli malproksime, kie la grizo kaj la verdaj makuloj ŝajne levigas el la blua maro, «Calvi».

«Ile d'Amour», Yvonne revis kaj Kant preskaŭ misglutis tro grandan mordon el la paneto.

La konversacio sekve temis pri la baldaŭa fino de la veturo.

Sen transiro, Kant demandis: «En la antaŭhieraa nokto vi ne estis en via kajuto?»

«Ne, mi estis supre, sur la ferdeko.»

«Jes, mis scias.»

«Ĉu vi do rekonis min?»

«Neniel.» Li rigardis la horizonton. «Kiel vi ne tuj konfesis tion?» La demando estis pli bedaŭra ol riproĉa.

«Mi... prefere prisilentis tion.» Ŝi iel hezitis. «Iom post la ŝakludo, Dubois denove maloportunis min. Li kutimis al tio. Li lokis sin antaŭ mian pardonon; tiam mi kuris supren kaj renkontis Doktoron Gulopez. Mi estis kontenta ke li gvidis min. Ĉirkaŭ la duono antaŭ noktmezo mi ree subeniris. Dubois ĝuste forlasis sian kajuton. Por ne renkonti lin, mi ree rapidis supren. Virino ne ŝatas paroli pri tiaj aferoj... Vi komprenas...»

Ŝi atendis la opinion de Kant. «Vi ja kredas min, sinjoro Kant?»

«Sed evidente, kaj mi komprenas viajn skrupulojn...» Li versis duan tason da kafo por ambaŭ. «Estis terura veturo.»

«Kaj ĝi tiel agrablis, se tiuj fiuloj...»

«La homoj ne malbonas, la cirkonstancoj igas ilin tiaj. Ĉu vi serĉos alian oficon?»

«Nu jes, mi ja devos, ĉu ne?»

«Sed vi ne ĉiam laboros», intence diris la Inspektoro. «Iam venos plaĉa junulo...»

«Plaĉa? Kio estas plaĉa, sinjoro Kant? Tio estas tiel relativa... kaj juna?... Oni ne determinas la junecon nur per naskiĝdatoj.»

Kant preskaŭ demordis la buŝojn de la pipo, kiun li intertempe ekfumis.

Sed por kio tia filozofado? Li ja ne havis ŝancon, li decidis. Finite! Kial peli sian kompatindan koron tra fajron, kiu jam tiel brulvundis lin?

«Iam vi edzigos junan, inteligentan kaj plaĉan viro, fraŭlino Durllet, jen miaj aŭguro kaj deziro.» Ili sonis iom patre.

«Ho! mi ne akordas kun vi. Ankaŭ

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo : 0,75 bfr.
Enpresigo kostas minimume 15 bfr.
Unu int. respondukuponon valoras 3 bfr.

BANKOFICISTOJ: nepre anoncu vin ĉe nia Banka Esperanto-grupo, kiu ekzistas ĉe «Banco di Roma», Filio de Milano, Via Bocchetto, 4, Milan (Italujo).

MALGRANDA REVUO, kvaronjara 48-paĝa periodaĵo, belaspekta kaj alt-nivela. Enhavas artikolojn plej diversajn de bonaj Esperanto-verkistoj. Ĉefredaktoro: St. Engholm. Jara abonprezo: 56 b. fr. Abonu ĉe via Libro-Servo: Flandra Esperanto Instituto, P. Van Humbeekstr. 3, Brussel W.

FILATELISTO deziras interŝanĝi p. m. kun flandraj samideanoj. Skribu al: Hans Borschert, Scheinfurterstr. 43, Bamberg Germanujo, U.S. Zone.

FILATELISTO, juristo en granda entrepreno, volas interŝanĝi p.m.: Ladislav Luksan, Usti n.L., Mosnova 5, Ĉeĥoslovakujo.

AŬSTRO deziras interŝanĝi p.m. kun belgaj samideanoj; skribu al: Salzburger Esperanto Verein «Verda Stelo», Postfach 65, Salzburg I, Aŭstrujo.

SVEDO deziras interŝanĝi p.m.; Erik G. Anderson, Rudensschöldsgatan 31, Lidköping, Svedujo.

ESPERANTO-POSTMARKO BULGARA (30 levoj): mendu ĝin ĉe F.E.I.; prezo po ekz.: 7 Fr.

mi jam multe esploris la mondon kaj, sur tiu tereno, mi akiris alian konvinkon.»

«Kaj ĝi estas?»

«Viro ne edziĝu antaŭ ol li fariĝis tridekjara kaj, ĉirkaŭ tiu ĉi aĝo, la virino jam iel... eksmodiĝas.»

«Vere, tion mi ne scias.»

«Kial vi ne edziĝas, Inspektoro?»

«Ĉar mi enamigis al virino, kiu ne akceptas min», li eligis.

«Sed tion mi pene konceptas. Ĉu ŝi jam fianĉiniĝis?»

«Ne...»

«Kaj ĉu ŝi rifuzis vin?»

«Ne, sed...»

«Vi do ne svatis ŝin?»

«Se tio ja neniam utilis!»

«Sed, tio ne estas pardonebla! Ĉu ŝi estas bela kaj juna, via fraŭlino?»

«Tio estas tiel relativa,» li lakone respondis. Nu, ĉio estu eldirita!

«Mi verŝajne tro scivolos, ĉu ŝi havas belan nomon?»

Kant konfuziĝis. Li sentis la sangon alflui lian koron.

«Vi tiel silentiĝas, sinjoro Kant? Ĉu mi eble maldiskretis? Nu, virinoj ja scivolos. Mi cetere intencis demandi nur ŝian antaŭnomon...»

«...Yvonne», Kant mallaŭte murmuris antaŭ sin kaj ŝajnis al li ke la eĥo miloble ripetis la nomon. La ondoj flustris ĝin unu al la alia kaj la milda venteto blovis ĝin al la jaĥto kiel plora kantatan lularion. Mara akcipitro cirklis alte en la aero kaj skribis per argentaj literoj en la mirinde hela lazuro: ...Yvonne... Yvonne...

Kant vekigis, rigardis supren kaj liaj okuloj versigis en la ŝiajn, kiuj nereale bluj kaj grandaj, plenaj de sindono, fiksrigardis la liajn.

«Yvonne,» li esperplene balbutis, «ĉu revo, ĉu realo...?»

Feliĉa, la knabino ridetis.

«...Vi estas tiel granda... kaj tiel forta... Ĉu alia eblo? Kaj krome post via brila sukceso en tiu komplika kazo!» Ŝi iom silentis kaj tiam intime diris plu: «Mi ankoraŭ faru konfeson al vi. En la antaŭhieraa nokto mi subaŭskultis vian konversacion kun Doktoro Gulopez. Mi... mi kredas ke mi komprenis vin, mi sentis ke temis pri mi. Ĉu eraro?»

«Ne, Yvonne,» Kant neniam feliĉis tiel.

«Ĉu ankaŭ mi uzu vian antaŭnomon?» ŝi ridetis.

«Ho!» Kant sopiris kaj lia ĝojo parte svenis.

Sed Gulopez ĝuste alpaŝis. Li kore salutis ilin.

«Inspektoro, mi komunikis al Profesoro De Groot kaj al la Kapitano vian konferenceton de la oka. Hans Joost invitas nin en sian kajuton. Ĉu tio konvenas al vi?»

«Nepre, Doktoro, ni ekiru. Ĉu vi akompanas... Yvonne?»

Nur pasa suprizo kovris la brunan vizagon de la hispano. Tiam li large ridis, tiel ke liaj blankaj dentoj brilis en la hela suno. Li firme premis manon de ambaŭ. Vortoj ja superfluis.

Antaŭ la pordo de sia kajuto staris, laŭ sia tuta largeco kaj flankite de la afable ridanta Profesoro De Groot, Kapitano Joost, kiu solene petis ilin eniri.

(daŭrigota)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 104, Turnhout.